

Tiel ni markas la 75an naskiĝjaron de Svisa Esperanto-Societo, parto 1a
Radioprelego de Claude GACOND, SRI 752, 1978.03.08 & 10 & 11

Cl.- Parolas gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond. Dum prelegaro ni prezentas al vi historion de la Esperanto-movado en Svislando helpe de tekstoj, kiujn ni ĉerpas el la revuo Svisa Espero. Tiel ni markas la 75-an naskiĝjaron de Svisa Esperanto-Societo.

A.- Ni jam raportis pri la optimisma etoso de la unua Ĝenerala Kunveno de Svisa Esperanto-Societo, kiu inspiris al Théophile Cart tiun ĉi falsan profetaĵon:

Cl.- «La antaŭan jaron ni estis kelkaj en Svisujo, nun ni estas pli ol cent, la venontan jaron ni estos pli ol mil.»

A.- Inter septembro 1903 kaj septembro 1904 la svisaj esperantistoj malkovris, ke la disvastiĝo de esperanto estas kompleksa afero, kiu dependas de multaj elementoj: nombro de la propagandistoj, financaj rimedoj, tempo necesa al la lernado de Esperanto, eldono de monata gazeto kaj de la necesaj lernolibroj, kaj tiel plu. Antaŭ tiom da laboro malfacile plenumbla la prezidanto E. Faillietaz el Lausanne demisiis. Lin provizore anstataŭis en la funkcio de prezidanto la kasisto J. Feierabend el Berno.

Cl.- La laboro de la dua Ĝenerala Kunveno, kiu okazis en Coppet, urbeto situanta proksime de Ĝenevo, la 11-an de septembro 1904, disvolviĝis en multe pli realisma etoso, ol la unua Kunveno.

A.- Financa raporto publikigita en Svisa Espero en septembro 1904 montras, ke Svisa Esperanto-Societo rikoltis en la jaro 1903-1904 148 kotizojn en Svislando kaj 49 kotizojn ekster Svislando. La eldono de la revuo Svisa Espero prezentis la ĉefan elspezon de la societo.

Cl.- Pastoro Friedrich Schneeberger estis elektita prezidanto de Svisa Esperanto-Societo okaze de tiu dua Ĝenerala Kunveno. Tiu elokventa protestanta pastro kun impona nigra barbo loĝis en Laufen apud Basel. Li estis la tipo mem de la misiisto. Preskaŭ fanatike li propagandos la Lingvon internacian Esperanto, kaj poste la Lingvon internacian Ido kaj la stenografian sistemon Stoez-Schrey, entreprenante preleg-vojaĝojn, kiuj daŭris plurajn semajnojn. En venonta elsendo ni havos la okazon pli detale raporti pri la dinamismo de tiu eksterordinara prezidanto, vera apostolo de esperanto en Svislando, kiu ne toleris kontraŭstaron kaj sin mem nomis 'Moŝteto'.

A.- Ekde somero 1904 la svisaj esperantistoj rigardis al Boulogne-sur-Mer kun granda entuziasmo. Okaze de intergrupa renkontiĝo, kiu kunigis esperantistojn el Calais kaj Douvres, advokato Alfred Michaux invitis la esperantistojn al Internacia Kongreso, kiun li intencis organizi en sia urbo.

Cl.- En Svisa Espero en septembro 1904 franc- kaj german-lingvaj artikoloj raportas pri tiu renkontiĝo Calais-Douvres. La aŭtoro de tiuj artikoloj bone konscias, ke la esperanto-movado vivas decidigajn momentojn. Jen la konkludo de tiu dulingva artikolo:

A.- «Tiu renkontiĝo inter du urboj tiel proksimaj geografie, sed tiel foraj lingve, tiu facileco por la anglaj esperantistoj kompreni la francajn esperantistojn, paroli kiel ili kaj kun ili, jen kio konfuzigos la nekredemulojn kaj kio pli faros ol ĉiuj akademiaj diskutoj. Jam nun oni povas antaŭvidi, ke la kongreso de 1905 havos grandan sukceson kaj kunigos en Boulogne

esperantistojn el ĉiuj nacioj. Ĝi estos la unua internacia kongreso, kie la delegitoj el ĉiuj rasoj kaj lingvoj povos sin kompreni rekte sen la helpo de interpretistoj.»

Cl.- En la sekvanta numero, decembro 1904, ni trovas interesan korekton, kiun sendis la sekretario de la Volapükista Grupo en Graz. Li memorigas, ke la unua internacia kongreso, kie la delegitoj el ĉiuj rasoj kaj lingvoj povis sin kompreni rekte sen la helpo de interpretistoj, okazis en 1889 kaj grupigis Volapükistojn. Tiu noto pravas, ke en tiu epoko ankoraŭ vivis volapükistaj grupoj.

A.- Doktoro Zamenhof sentas la bezonon uzi la influon de sia personeco por instigi kiel eble plej multajn esperantistojn partopreni la kongreson en Boulogne-sur-Mer. Jen citado el letero, kiun publikigis Svisa Espero en januaro 1905. En ĝi Zamenhof diras:

Cl.- «Se la kongreso estos bone aranĝita, tiam ĝi ne sole fortege puŝos antaŭen nian aferon en la tuta mondo, sed ĝi povos ankaŭ regule esti ripetata ĉiujare en alia loko kaj fariĝi por ĉiam plej aŭtoritata centro esperantista, kiun nia afero jam de longe bezonas.»

A.- Zamenhof, per frazeto, kiun li tre verŝajne bone meditis, anoncas sian nepran alvenon:

Cl.- «Kvankam por mi persone la alveturo estas tre malfacila, mi tamen streĉos ĉiujn miajn fortojn kaj mi nepre alveturos.»

A.- Leginte tion, multaj hezitemuloj ankaŭ decidas:

Cl.- «Ankaŭ mi nepre ĉeestos.»

A.- Alia letero de Zamenhof publikigita en marto 1905 trankviligis la esperantistojn, kiuj aŭdis, ke Zamenhof devis forveturi al la milito. Aŭdu:

Cl.- «En la komenco de januaro, mi ricevis de mia milita estraro la ordonon forveturi al la milito Mandĵurujon kiel kuracisto! Poste, pro la malforta stato de mia sano, oni min liberigis de tiu ĉi devo, kaj mi povas nun trankvile daŭrigi mian laboradon por nia afero. Pro la alvoko kaj poste pro la liberiĝo mi ricevis de ĉiuj flankoj tre multe da varmege amikaj kaj bondeziraj leteroj.»

A.- Tiel, Zamenhof, anstataŭ devi veturi orienten, sin pretigas veturi okcidenten por alia milito. En Svislando pluraj batalantoj sin pretigas lin renkonti. Oni ne povas imagi la febrekan etoson, kiu tiam karakterizis la esperanto-vivon. Se sukcesos la kongreso, venkos la lingvo de Zamenhof. Do, la kongreso devas sukcesi. En Svislando oni aranĝis monkoklekton por helpi la ĉeeston al oficiala delegito.

Cl.- Vi aŭdis prelegon el Svislando. Parolis gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond. Ĝis reaŭdo!